Kio protektas Nordan Amerikon antaŭ dronigado?

La eŭropaj Alpoj estis formitaj ekskluzive pro la kunpuŝiĝo de kontinentaj platoj; iliaj radikoj etendiĝas en la grundon duoble profundaj ol tiuj de aliaj pejzaĝoj. Kaj ĝia interno estas malvarma.

Laŭ plej novaj geologiaj ekzamenoj, en Norda Ameriko tio estas tute alie. Tie la varmec-variado en la profundo egalas al la suprakaj-malsupra-strukturo de la surfaco: ju pli varmega la krusto, des pli alta la pejzaĝo. Tridek kilometroj sub la 1500 m alta Kolorada Plataĵo regas varmo de 650 gradoj da Celsio, sub la "Grandaj Altebenaĵoj" (*Great Planes*) nur ĉirkaŭ 500°C.

La varmega ŝtonaĵo en la profundo ŝveligas la nordamerikan kontinenton kvazaŭ kiel kukopaston kun gisto. Sen tiu ĉi varmego la tuta kontinento jam delonge estus sinkinta en la maron. Se la temperaturo de la tiea terkrusto malaltiĝus laŭ la plej malvarma temperaturo sub la aliaj kontinentoj, tiam la urbo Ĉikago kuŝus preskaŭ 700 m sub la marnivelo, Lasvegaso eĉ 1300 m.

Vivu la varma gistopasto! (Fonto: *Brockhaus*-kalendaro, 2009-09-28)

Ĉu Ameriko kaj Eŭropo malproksimiĝas unu al la alia?

Politike ni ignoru tiun ĉi demandon; por tio estas ofte decida la koncerna politika formo laŭtagorda. Sed geologie oni pli facile trovas fidindan respondon.

La "mezoceana dorso" estas kvazaŭ grandega konstruejo de nia Tero, el kiu seninterrompe fontas lafo. 60 000 km longa kaj ĝis 3 km alta ĝi serpentumas super la grundo de la oceanoj. Dekstre kaj maldekstre driftas apartige la terplatoj. Sed la lafo ne eliĝas laŭlonge de la dorsoverto de la montaroj, sed pli vere el dekstra- kaj maldekstraflankaj "kamentuboj". Krom la puŝegado kaŭzita de la daŭra laferupcioj ankaŭ kurigas subtere flosantaj rokaĵotorentoj la platojn – en Atlantiko laŭ nordokcidenta direkto. Tio kaŭzas, ke Ameriko kaj Eŭropo malproksimiĝas unu for de la alia – unu fingrolarĝecon en tempodaŭro de unu jaro.

Se hodiaŭ Kristoforo Kolumbo denove devus krozi Atlantikon, li devus veli pliajn 12 kilometrojn ol antaŭ 500 jaroj.

(Fonto: *Brockhaus*-Kalendaro 2009-12-12/13)

La unua Eŝvegano estis neandertala homo

Por la unua fojo konfirmiĝis, ke en la Norda Heslando de Germanujo vivis homoj jam antaŭ ĉ. 40 000 da jaroj. "Tranĉspuroj kaj batsignoj je la pelvaj ostoj de lanharrinocero, kies restaĵoj antaŭ 10 jaroj estis elfositaj en gipsminejo en Oberhono (*Oberhone*), urboparto de Eŝvego (*Eschwege**), indikas prilaboron per homaj manoj", diras la heslanda ĉefpaleontologo d-ro *Thomas Keller*, kiu nomas tiun ĉi malkovron "malgranda sensacio". Li save protektis la ostojn, post atentigo de la "Eŝvega Akciosocieto pri Antaŭa kaj Praa Historio" en la jaro 2000, sed nur en la pasinta jaro purigis kaj ekzamenis ilin.

Homosapiensa setlado kvinmil jaroj pli poste

D-ro *Keller* estas certa, ke la ostoj estas prilaboritaj de neandertalaj homoj, ne de *Homo sapiens*. "La hodiaŭa homo enpenetris la regionon norde de Alpoj nur antaŭ 35 000 da jaroj", klarigas la sciencisto. "Sed la ostoj estas almenaŭ 40 000 jaraĝaj, eble pli. La precizan aĝon rezultigos plua ekzameno".

La 50 cm longa osto montras plurajn linearajn tranĉspurojn kaj enhavas V-forman noĉon, kiu eble originas de batego, eble per fajroŝtono. Restas tamen enigme, ĉu la neandertaluloj mem ĉasis kaj

* Eŝvego = *Eschwege an der Werra*, Germanujo. Longitudo 10,0667 / E 10°4'0'', Latitudo 51,1833 / N 51°11'0''